# ORIENTA STELO

**Marto 2014**

**NUMBER 295 NUMERO**

Orienta Esperantista Federacio — Originale fondita en aprilo 1932

Eastern Esperanto Federation — Originally founded in April 1932

**Kontaktdetaloj**

| | | | |
|---|---|---|---|
| Roy Threadgold | Prezidanto | 01371850481 | roy@boydellsdairy.co.uk. |
| Ben Gosling | Sekretario | 01787247737 | benjamin.gosling@btinternet.com |
| Barrie Murphy | Kasisto | 01702472193 | celiaandbarrie@tiscali.co.uk |
| Mark Drake | Komitatano | 02085188094 | marko.drejko@gmail.com |

***Tiuj kiuj ricevas OS rete, ricevas ĝin pli frue kun koloraj bildoj, kaj samtempe la Federacio ŝparas la poŝtkoston. Ĉiuj gajnas! Nur bezoniĝas informi al Roy T. pri via retadreso.***

.........................................................................................................

# Agrabla renkontiĝo en Finchingfield



Nia oktobra kunveno okazis en Finchingfield, laŭ onidiro, unu el la plej belaj vilaĝoj en la lando. Ok anoj amasiĝis en la URC preĝejo, nia hejmo dum la tago.

Grava parto de la programo estis nia promeno, sed bedaŭrindas ke dum nia foriro for de la preĝejo, alvenis naŭa ano, Alan, kiu serĉadis nin dum horo tra la tuta vilaĝo sed malsukcesis trovi nin. Kie ni troviĝis? Eble en la Gildhalo – tre malnova sed lastatempe renovigita konstruaĵo (tuj maldekstre de la preĝejo en la supra foto) kiu nun estas muzeo, entenante multajn antikvaĵojn.



Aŭ eble ni estis en la paroĥa preĝejo mem kie ni grimpis laŭ ŝtuparoj kaj ŝtuparetoj ĝis la supro de la turo. Mi ne certas kiel traduki "Sod's Law", sed tuj kiam ni eliris sur la turtegmenton, ekpluvis! Tamen oni povas ĝui de tie la vidaĵojn de la tuta vilaĝo – la ventmuelilo, lageto kaj la fona kamparo.

Reveninte en nian komfortan ĉambron (sen nia kompatinda serĉinto, kiu finfine rezignis kaj hejmeniris – multajn padonpetojn Alan), ni rapide revarmiĝis. Programero estis prelegetoj pri lastatempe legita libro sed tiu evoluis aŭ forvagis en diskuton pri hejma hejtado, hejtkonservado, izolado, kontraŭventetiloj ktp.

## Annual Meeting

**Saturday 29th March**

**St Michael's Church House,Braintree**

*(Immediately to the east of St Michael's Church)*

11 am – 5 pm

Day Money £5 <u>includes lunch.</u>

All welcome, regardless of linguistic ability. Discussions, games, walk (weather permitting) and an illustrated talk on South Africa by Kimie Markarian, plus, of course, the AGM

## Printempa kunveno

Sabaton la 29an de marto

ĉe Church House, St Michael's Lane, Braintree

11.00 atm - 5.00 ptm

Tagmono (kiu inkluzivos lunĉon) £5

Kimie Makarian distros nin pere de parolo pri sia februara vizito al Sudafriko, PLUS diskutoj, ludoj, promeno (se eble) kaj la jarkunsido mem.

.

**Notu ankaŭ nia somera kunveno ĉe la baptista preĝejo,Whitton, Ipswich la 24an de majo, 11.00 atm - 5.00 ptm Detaloj en la venonta OS**

**Vivu longe eseksaj knabinoj (Essex girls)!**

Viro aŭdis perradie ke aŭto raportiĝis veturante kontraŭ la trafikon laŭ la A12. Sciante ke lia amantino estis sur tiu vojo, li telefonis al ŝi.
"*Estu ege  zorga karulino*" li diris, "*ĉar mi ĵus aŭdis ke iu idioto veturigas sian aŭton en la malĝusta direkto.*"
"*Ne nur unu,*" ŝi respondis, "*Jen centoj da tiaj.*"

